Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**4-a de septembro 2020, numero 15**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La Tago de Ameriko



La Tago de Ameriko estis la lasta el la regionaj tagoj de la Monda Festivalo de Esperanto (Mondafest'). Ĝi okazis la 30-an de aŭgusto 2020. Sekvante la promenon de la suno sur la planedo, la Festivalo havis kiel unuan regionan tagon la Tagon de Azio kaj Oceanio (TAO), la 26-an de junio. Postvenis la Mezorienta kaj Nordafrika Tago (MONAT), la 4-an de julio. La 22-an de aŭgusto kaj la 23-an de aŭgusto estis respektive la tagoj de Eŭropo kaj Afriko. Kaj la 30-an de aŭgusto okazis la Tago de Ameriko (TA).




La evento estis festado de kulturo kaj solidareco kaj okazis virtuale per Zoom kaj ĝi samtempe estis spektebla per YouTube ĉe la kanalo UEAViva. La filmeto eblas (re)spekti, ĝi troveblas ĉi tie – https://mallonge.net/6e.

La prezidanto de la organizteamo estis Rafael Despradel Hernández (Dominika Respubliko). Respondecis pri teknikaj aferoj Luis Obando (Kolombio).

Skizon de la programo de la Tago de Ameriko vi povas trovi en la paĝo dediĉita al ĝi ĉe Eventa Servo – https://eventaservo.org/e/ameriko.




En la oktobra numero de la revuo *Esperanto* aperos detala raporto pri la evento.

## Belartaj Konkursoj de UEA 2020




La sesan de septembro je la 14-a horo laŭ UTC okazos la ceremonio de disdono de premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA, en la kadro de MondaFest'.

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# AMO 67 – reveno al la brula temo post 50 seminarioj

Stefan MacGill

Tiu seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) ekos post nur du semajnoj, virtuale gvidata el Pollando kun teknika helpo el Irano. Kio estas tiu brula demando? Jene: Kiel ni en Eŭropo sukcesu rejunigi nian komunumon? Pli precize, jen la temo de AMO 67: **Varbado de Junuloj en Eŭropo.**




Aktivula Maturigo - Virtuala

Artikolo pri la temo aperis en la revuo *Esperanto* (1296 (11) Novembro 2015 – interalie nun senpage elŝutebla ankaŭ por ne-membroj ĉe https://uea.org/revuoj/esperanto – *Red.*). Tio estis pretigita kiel prepara materialo por AMO 17, okazigita en la hungara urbo Eger silvestre de 2015–2016. Ni reatentigas pri la artikolo, ĉar ĝi restas deprime aktuala. Esence, la du eventoj, disaj je 50 seminarioj, revenas al la sama nesolvita problemo. Eĉ kiam AMO 24 en Odenso, Danio, traktis rilatan temon kaj faris konkretajn rekomendojn pere de FLAM-analizo.

Kial el AMO rezultas tiom malmultaj atingoj? Nu, ĝi altiras lavangon de bonaj ideoj kaj proponoj kaj eĉ detalaj planoj kaj rekomendoj, sed mankas la rimedoj – financaj kaj homfortaj, agpretecaj – por transformi tiujn proponojn al projektoj.

Anoncu vin kun deziro partopreni en la seminario, kaj ni sendos al vi la alirajn informojn en la tagoj antaŭ la aranĝo, kiu okazos posttagmeze de la 13-a de septembro.

Por tio kontaktu stefan.macgill@gmail.com.

# Finiĝis interreta publika Esperanto-kurso en Ĉinio

Gong Xiaofeng (Arko)

La kurso daŭris 5 monatojn de la 17-a de marto ĝis la 11-a de aŭgusto. 90 minutojn ĉiusemajne. Ĉiu leciondonado aperas ĉe la platformo kiel "spektaĵo", oni povas (re)spekti iam ajn poste en la platformo. Laŭ la statistiko ĉiufoje vizitis la kurson 12-60 homoj kaj entute estas 1300 fojoj da (re)spektoj. La ciferoj ankoraŭ pliiĝas.

Origine, tiu ĉi Esperanto-kurso en interreto funkciis marte laŭ peto de iuj emeritoj 50–65-jaraj en Pekino, kiuj restas hejme kaj ne rajtas partopreni ian ajn eksterdoman aktivadon pro la pandemio. Fakte vizitis la kurson ne nur komencantoj kaj komencintoj, kiuj lernis nian lingvon en la 1980-aj jaroj, sed ankaŭ kelkaj veteranaj esperantistoj. Inter ili troviĝas emeritaj profesoroj, studentoj, junuloj, instruistoj, laboristoj, aliaj pensiuloj ktp., en la aĝo inter 20 kaj 75 jaroj.

Ni uzas la lernolibron de Stano Marček *Esperanto per rekta metodo*. Dank' al Stano Marček kaj *Edukado.net*, mi elŝutis materialojn pri tiu ĉi lernolibro por fari miajn prezentaĵojn, kiujn kursanoj tre ŝatas kaj laŭdas. Multaj esprimis sian deziron daŭrigi la kurslernadon de meznivela aŭ paroliga kurso.

# Laŭtempa ĝustigo de la muzika programo de la Tago de Eŭropo

En la 14-a numero de la *Festivala Kuriero* aperis artikolo pri la Tago de Eŭropo. Sube aperas laŭtempa ĝustigo de la muzika programo. La plenan programon vi povas spekti tute libere en la YouTube-kanalo *UEAViva* – https://mallonge.net/5z

La muzika programo de la Tago de Eŭropo estis la jena:




0:06:51 Gijom Armide – *Kaj ĉio ĉesis*

0:31:14 Gijom Armide – *La postrompiĝa temp'*

2:43:41 Francis Soghomonian – *Ami por ambaŭ ni*

3:37:05 La Perdita Generacio – *La pasinta generacio*

3:52:25 ĴeLe – *Nun liberas mi*

4:20:22 Kajto – Koncerto



# Apetitvekaj eksperimentoj: la tutsemajna "gustumado" de la Itala Kongreso

Sara Spanò

La 29-an de aŭgusto konkludiĝis, kadre de MondaFest', la tiel baptita "Gustumado" de la Itala Kongreso, virtuala nov-elpensita aranĝo kiu dum tuta semajno, dum du horoj ĉiutage, ebligis al la spektantoj ĝui la ĉefajn ingrediencojn de la Itala Kongreso, prokrastita ĝis 2021 pro la nuntempa sankrizo.

Prelegoj, premiado de la tradukkonkurso kaj kanzonkonkurso okazigataj de Itala Esperanto-Federacio, ateliero pri verkado, virtualaj ekskursoj pri la kongresa regiono (Umbrio, en centra Italio), muzikaj momentoj, rondtablo pri la temo de la Monda Festivalo – la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj –, estis prezentitaj, en harmonia sinsekvo, kadre de tiu ĉi altnivela kaj internacia (kaj laŭ la kontribuantaro kaj laŭ la publiko) antaŭplado.

La vigla reĝisorado de Michela Lipari, prezidantino de IEF, kaj la lerta teknika prizorgado de Debora Rossetti, estraranino de IEF respondeca pri komunikado, brile kompletigis la gustumadeksperimenton. La finajn prezidantajn salutojn markis invito plenĝui la ĉefpladojn proponotajn de la venontjara 87-a Itala Kongreso de Esperanto (Assisi, 20–27 de aŭgusto 2021).

Pli da detaloj sekvos en la oktobra numero de Revuo *Esperanto*; intertempe, ne maltrafu la ŝancon spekti (ĉu unuafoje, ĉu denove) ĉiujn gustumadprogramerojn ĉe la [Jutub-kanalo de Itala Esperanto-Federacio](Jutub-kanalo de Itala Esperanto-Federacio).

Beletra rubriko

# La bruo el l' atiko

originale verkita en Esperanto

Jose Carrillo (Ĵosefo, Kanado)

Foje malfrue nokte, mia edzino Lea vekis min. Ŝi diris al mi: "Ĵosefo! Ĉu vi aŭdis tiun bruon? Estas io en l' atiko!" Nenion mi aŭdis. Ankoraŭ nenion mi aŭdis. "Ne zorgu! Estas nenio. Ni reendormiĝu," mi diris al ŝi.

Ni reendormiĝis.

Kelkajn horojn poste, ŝi revekis min. "Ĵosefo! Mi denove aŭdis tiun bruon! Estas io en l' atiko! Iru kaj kontrolu tion, kio estas tie." Mi respondis "Jes, mia kara." Tiam, mi iris al l' atiko kun poŝlanterno. Estas malhele ĉe l' atiko.

"Mi trovis nenion," mi diris al mia edzino. Subite ni aŭdis kriegon malsupre!

"Paĉjo! Panjo!" mia filino Kajla kriis. Mi kuris malsupren el l' atiko kaj demandis al Kajla "Kio okazis?"

Plorante ŝi diris: "Mi vidis teruran sonĝon! Mi sonĝis, ke mi flugas per flugiloj, kaj iu sekvas min".

Mi diris al ŝi: "Ne zorgu! Estis nur malbona sonĝo."

Ni ĉiuj reendormiĝis.

Matene de la sekva tago, mi vekiĝis antaŭ ĉiuj aliaj. Mi trinkis kafon ĉe la malantaŭkorto.

Subite mi ekvidis tion, kio – mi pensis, – estis fluganta birdo. Tamen, ĝi ne estis birdo.

* * *

Ĝi flugis kvin foje ĉirkaŭ la malantaŭkorto. Mirige estis vidi vesperton malfrue matene. Estis sune, kaj vespertoj estas noktaj bestoj.

Neniam mi vidis vespertojn dum miaj dudek jaroj en Kanado. Ĉi tiu vesperto aspektis juna kaj perdita. Eble ĝi perdiĝis hieraŭ nokte, kiam ĝi ĉasis. "Ĉu ĝi ne plu povas trovi sian loĝejon?" mi pensis.

Subite, ĝi flugis al eta breĉo inter la brikoj de la malantaŭmuro kaj la tegmento, poste ĝi rampis tra truo en mian domon.



"Ho ve! Ĉi tiu vesperto loĝas en mia hejmo! Ĝi loĝas en l' atiko!"

Nur tiam mi komprenis la bruon, kiun mia edzino aŭdis hieraŭ nokte. Estas vesperto en l' atiko!

Mi vekis mian edzinon kaj diris al ŝi pri la vesperto. Ŝi kriegis!

Tuj ŝi petis min voki la plagokontroliston.

(La daŭrigon legu en la sekva numero de la *Kongresa Kuriero*)

# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope





Koncerto: jOmO





Scienca Forumo




Eventa Servo (Yves Nevelsteen)





Virinaj voĉoj




Koncerto: Amir Naor – Israelaj kantoj




Koncerto: Gijom': "Kaj ĉio ĉesis"




Klerige: Edukado ĉe Interreto




Venontaj UK-oj: Montrealo 2022